

Rüdiger Eichholz (kunordiganto, †)

**Perkomputora Termino-Kolekto
(Pekoteko)**

1985-1994

Enkondukoj al la dua volumo

de

Rüdiger Eichholz (†)

Edward Spitaels (†)

Bernhard Pabst

Enhave senŝanĝa represo

Berlino 2006

Antaŭparolo de R. Eichholz al la dua volumo de PP 85-90

En tiu ĉi volumo troviĝas kontribuoj de du el miaj plej aktivaj kunlaborantoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis daŭrajn Pekoteko-numerojn (vidu paĝon 18 en la unua volumo). Vi konstato grandan diferencon inter tiuj ĉi registraĵoj ne nur, ĉar ili traktas malsamajn temojn, sed ankaŭ pro tio, ke la kunlaborintoj donis al si malsamajn taskojn:

Edward Spitaels (es) eklaboris sur virga kampo: Neniu Esperantisto antaŭe interesiĝis pri terminoj por elektronikaj muzik-instrumentoj. es estis tial tute libera krei tiujn fakterminojn, por kiuj li sentis bezonon, kaj kiujn li taksis taŭga. Dum la jaroj li konstante plibonigis siajn difinojn kaj terminoproponojn, pri kio atestas la jam en junio 1990 de mi fotokopie eldonita labor-dokumento: "Terminaro pri elektronikaj muzik-instrumentoj". Komparu ĝin kun la pli nova terminaro en tiu ĉi volumo, kaj vi konstato multajn ŝanĝojn kaj fruktojn de diligenta laboro. Pro lia nun pli vaste distribuata terminaro li espereble ricevos multajn reagojn, por ke li ne plu tute sole devos okupiĝi pri tiu interesa fako.

Bernhard Pabst (pb) plenumis alispecan laboron: Lia intenco estas kompili juran terminaron. Por ke ĝi baziĝu sur jam establita tradicio, li unue ekzamenis nian juran literaturon kaj registris amasegon da fakaj terminoj. Pro tiu procedo ofte mankas en liaj registraĵoj difinoj kaj etnolingvaj terminoj. Menciinda estas, ke li registris ankaŭ tiujn terminojn, kiujn li ne ŝatis, ĉar tiel li havis la eblecon, atentigi pri mankoj kaj fari plibonigo-proponojn. Ĉiam li akurate indikis la precizan lokon, kie iu termino estis uzita, por ke oni povu esplori, en kiu kunteksto ĝi aperis. Nun ĉiu kunlaboranto rajtas marki per EVIT tiujn terminojn, kiuj ne ŝajnas esti taŭgaj, kondiĉe ke tiu ĉi pravigas sian opinion. Tiel ni ricevis valoran diskut-bazon.

Kompilante la indeksojn mi rimarkis duoble registritajn nocio-kompleksojn. Ilin mi jam eliminis kaj referencis de ne plu uzindaj numeroj al la aktualaj. Aliaj enhavas parencajn nociojn, kiujn oni devus kune trakti. Tial, se kunfando de kelkaj kompleksoj ŝajnas al mi dezirinda, kion mi notis sub **Rim.**: Je la indeks-kompilado mi malkovris krome multegajn tajp-erarojn, kiujn mi korektis ne nur en la elektronika registraĵo sed grand-parte ankaŭ en jam printita teksto. La lasta laboro estis tre temporaba. Tamen multaj tajp-eraroj troviĝas probable ankoraŭ en la registraĵoj, kiujn ni iom post iom forigu. Konstante okazos ŝanĝoj en la registraĵoj, tial tiuspecaj eraroj espereble ne tro ĝenos.

pb jam grandparte registris liston el NEPIVAJ VORTOJ de *André Cherpillod* (ac), por ke la Esperanta radikaro en Pekoteko fariĝu kiel eble plej kompleta. En tiu listo troviĝas tamen tiom da mankoj, ke mi decidis eldoni en presita formo nur terminojn komenc-iĝantajn per la litero A. Tiuj registraĵoj troviĝas en la 90/ac-serio en tiu ĉi volumo. La kruda elektronika versio de la kompleta NePIV estas havebla. Kiu helpas prilabori ĝin, por ke ĝi povu aperi en la venonta eldono de Plena Pekoteko?

1992-10-16
R. Eichholz

Antaŭparolo de Edward Spitaels

Kiel pensiulo, iama teknikisto pri elektromekanaj aparatoj, kaj preskaŭ kvindekjara Esperantisto mi havis la ideon okupi min pri muziklernado. La ludota instrumento estus por mi sendube iu sintezatoro aŭ elektronika muzik-instrumento. Mi jam kolektis kelkajn reklamajn faldfoliojn kun komplikaj teknikaj eksplikoj. Kelkaj estis Nederlandlingvaj, aliaj Germanlingvaj aŭ Anglalingvaj. Mi rimarkis, ke la uzitaj terminoj en ĉiuj tri lingvoj devenis kutime el la Angla. Mian atenton ekde tiam kaptis pli la terminoj ol lernado de muziko. Mi provis Esperantigi la priskribojn. Tio ja devus esti ebla, se nia lingvo kapablu esprimi ĉion en ĉiuj fakoj, ĉu ne? Intertempe mi ankaŭ interesiĝis pri komputoroj. Mi aĉetis unu, sed neniam sukcesis printi la Esperanto-literojn kun supersignoj. Kiel multaj aliaj samideanoj, mi aĉetis nek la ĝustan tipon nek la ĝustan programon. Tiam en 1987 s-ro R. Eichholz vizitis nian Esperanto-klubon en Antverpeno. La rezulto estis, ke mi printempe aĉetis taŭgan komputoron kaj programon, kaj ke mi decidis helpi lin je lia grandioza plano kompili grandegan elektronikan fakvortaron. Mi ne estis kompetenta en terminologio, do mi pretis plenumi iun ajn taskon.

Hazarde li en la somero de 1988 ree estis en Eŭropo. Mi invitis lin ĉe mi hejme, kaj post interkonsilo li instigis min kompili vortareton pri tiu fako, kiu min plej interesas. Mi montris al li mian malgrandan kolekton de broŝuroj pri elektron-ikaj orgenoj kaj li opiniis, ke tio estus bona bazo por eklabori sur tute virga kampo, por kiu ankoraŭ neniu klopodis krei trafajn Esperantajn terminojn. Tiel mi startis mian Pekoteko-projekton pri ELEKTRONIKAJ MUZIK-INSTRUMENTOJ.

Ni kune registris la unuajn dudek nociojn. Kaj poste mi daŭrigis la laboron. Mi ofte stumblis, eraris, konsultis vortarojn, aĉetis kelkajn novajn vortarojn kaj je la fino de la jaro mi sendis mian unuan moldiskon kun registraĵoj al Kanado.

Revenis baldaŭ la moldisko, kun multaj rimarkoj kaj konsiloj. Mi konstatis, ke mia instruanto estas tre sperta komputoranto kaj termino-kreanto. Se mi havis alian ideon, termino-proponon aŭ esprimmanieron, li aŭ akceptis ĝin aŭ metis sian opinion en rimarkon aŭ en privat-komenton. Ni ofte sendis tien kaj reen moldiskojn, kaj la registraĵoj fariĝis ĉiam pli trafaj kaj laŭregulaj.

Jes, laŭ-regulaj! Ĉar Pekoteko povas funkcii glate nur, se ni ĉiuj registras terminojn kaj difinojn sammaniere. Sed estis plezure konstati, ke des pli laŭregule ni laboris, des pli facile eblas legi la tekstojn kaj listigi la terminojn alfabete aŭ laŭnumere.

Mi devas menciigi ĉi tie, ke mia amiko Alberto FERNANDEZ, aŭtoro de la libro SENĜENAJ DIALOGOJ pretis korekti miajn difinojn. Ankaŭ de li mi lernis kiel difini laŭstile. Kapabla korektanto ne estas malhavebla. Oni malbone rimarkas siajn proprajn erarojn. Mi ne fanfaronas pri miaj kapabloj, kaj verŝajne neniam povos, sed mi esperas, ke mia strebado liveri konsulteblan kolekton de terminoj pri fako, kiu evoluas paralele al informadiko, kun difinoj, kiuj ankaŭ eksplikas, helpu multajn muzikantojn kompreni la funkciadon de iliaj instrumentoj kaj la priskribojn en la fakliteraturo.

Mi esperas, ke mia laboro instigos fakulojn, kiuj ŝatus kontribui al la evoluigo de nia lingvo en iliaj fakaj terenoj, ke ili eklaboru en la Pekoteko-kadro. Ni ne plendu pri mankantaj fakvortoj, sed ni faru ion por forigi tiun mankon. Ke tiu ĉi okupo donas grandan kontenton al pensulo, pri tio mi povas atesti.

Edward Spitaels
Tijlleen 17, B-2900 Schoten, Belgio
Tel. 03/658 74 20

Enkondukaj vortoj de Bernhard Pabst

Mi prizorgis precipe tri termino-kolektojn, kiuj grandparte troviĝas en tiu ĉi verko:

1. kolekton de ĉirkaŭ dumil juraj, politikaj kaj historiaj nocioj;
2. ĉirkaŭ 1500 de la "Ne-PIV-aj vortoj", kiujn trovis *André Cherpillod* en tuta fasko da naci-lingvaj Esperanto-vortaroj;
3. kelkcenton da "vortoj de la nuntempo", kolektitaj el diversaj aktualaj gazet-artikoloj en la kadro de la kampanjo "Fariĝu lingvo-observanto".

1. La kolekto de juraj terminoj (89/pb-0001 ĝis 89/pb-1967)

Ĝi devas esti rigardata kiel malneta "labor-dokumento". Tio signifas, ĝi neniel pretendas esti ia

preta jura terminaro. Kontraŭe ĝi nur estas ie sur la vojo al jura terminaro. La sola tialo de ĝia jama publikigo en la kadro de Plena Pekoteko estas ebligi al interesatoj, kiuj ne povas aŭ volas uzi komputoron, kunlabori en la verkado de jura vortaro. Tiu ĉi prova eldono instigu al kunlaboro, kompletigo, korekto kaj kritiko.

La fako "juro" apenaŭ estas nete limigebla. Same kiel en etno-lingvaj "juraj" terminaroj ni komprenu ĝin vastasence kaj enkludu ekonomiajn, politikajn kaj aliajn terminojn. Mi sekvas la maksimumon "en duba kazo ni enmetu terminon" kaj tial ekzemple registris la oficialajn nomojn de kelkaj ŝtatoj (Usono, USSR), ĉar tiujn oni ja povas kompreni fakajn esprimojn de internacia (interŝtata) juro. Ni ne perdu tempon diskuti pri la "jureco" de termino. En fina versio ni ankoraŭ povas forstreki troajn.

La unua celo de tiu ĉi verko estas laŭeble kompleta kolekto de jam ekzistantaj, sed dise publikigitaj juraj terminoj. Unue ĝi do donu respondon al la demando: "Kio jam ekzistas?" Tial mi unue penis kolekti ĉiujn "jurajn" tekstojn en Esperanto. Partoj el ili aperas en la listo de la referenc-verkoj (paĝo 613). Tie estas klarigitaj la tie ĉi uzitaj mallongigoj. Poste mi kreis konkordancojn de la du gravaj juraj verkoj <AP> kaj <JTP>, ambaŭ el la plumo de la verŝajne plej grava Esperantisto-juristo, *Ivo Lapenna*, kiu bedaŭrinde intertempe mortis. Vaste, sed tute ne elĉerpe, mi uzis la bonegan konkordancon pri la vort-provizo de la Internacia Jura Revuo <IJR>, farita de ĝia iama teknika redaktisto *Tom Arbo Høeg*. Parton de la terminara provizo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj <Ĉ> mi povis facile enmeti pro la persona konkordanco de s-ro *Ralph Harry*, kiu estis unu de la traduk-intoj de tiu eminente grava dokumento de internacia juro. Al ambaŭ mi dankas pro la donita subteno kaj preteco helpi.

La prilaboriteco de tiu grupo de terminoj estas, ke mi simple registris ilin kun fontoj kaj ofte krome aldonis Germanan tradukon, se ĝi ŝajnis al mi evidenta. Tial ĉe la plej multaj terminoj originantaj el la konkordancoj ankoraŭ mankas difinoj.

Alia grupo estas terminoj ĉerpitaj el vortaroj, precipe el PIV, DU, ME, VA kaj (ĝis nun nur parte) LI. Celo rilate al ili estas kunigi disajn proponojn en unueca facile konsultebla formo. La terminoj trovitaj tie jam estas - escepte de tiu prenitaj el LI - difinitaj kaj parte tradukitaj. Plej ofte mi sekvis la proponojn de la verkoj, tamen penis adapti ilin al laŭeble unueca ekstera kaj ortografia formo, ekzemple skribinte derivaĵojn de propraj nomoj unuece per majuskloj. Mian kritikon aŭ miajn dubojn mi aldonis sub "**Rim:**".

Tria grupo estas termin-proponoj de mi, kiuj originas el mia privata kartaro pri juraj terminoj, kreskinta dum la jaroj, verkinte jurajn artikolojn. Se

interesito havas similan privatan "man-terminaron", li aŭ ŝi bonvolu aldoni ĝin.

Kvara grupo fine originas el la observado de la lingvo-uzo de MON.

Fine ankoraŭ ekzistas kelkaj pliaj fontoj laŭcifere ne tiom gravaj.

Por ripeti ĝin: En unua paŝo mi celas elmontri pli-malpli ĉion, kio jam ekzistas. Tio ŝajnas al mi grava por gardi la tradicion kaj kontinuecon. Nuntempe multaj ŝajne preferas "aŭdace" krei novajn terminojn anstataŭ longe kontroli, ĉu termino por celata nocio jam ekzistas. Kelkfoje iuj eĉ ne penas konsulti PIV-on! Estas tio, kion mi emas nomi la "golpo-fenomeno" (89/pb-1883).

Mi konscias, ke pro la de mi elektita vojo la terminaro apenaŭ eĉ nur iom dense kaj sisteme kovras iun subfakon, kion oni eble sukcesas laŭ la metodo aldoni al jam ekzistanta plurlingva terminaro Esperantan tradukon. Tion mi ankaŭ en la nuna stato ne esperis. La vortmaterialo de ĉi tiu volumo aperas sisteme ordigita en la UDK-indekso. Kunlaborantoj do facile povas kompletigi siajn specialajn subfakojn, ĉu kriminala juro, ĉu civila proceduro, ĉu internacia privata juro, ĉu io alia.

La diversaj metodoj ne elkludas sin reciproke. Mia celo estas faciligi al tiuj estontaj klopodoj la aliron al la jam ekzistanta vort-materialo. Miaj planoj pro tio unuflanke estas registri la vort-provizon de pliaj juraj tekstoj. Kunlaboremaj interesitoj verku pliajn konkordancojn, mi laŭpete sendos kopiojn de ankoraŭ trarigardindaj verkoj.

Alia giganta tasko estos registri tajpitan kvinlingvan manuskripton de jura terminaro, verkitan de d-ro *Ladislao Dubravsky*. La registraĵoj 90/pb-2000 ĝis 90/pb-2288 montras la komencon de mia laboro. Ĉar mankas entute difinoj en la verko, UDK-numeroj ankoraŭ ne povis esti atribuitaj. Tial tiuj terminoj ankaŭ ne povis aperi en la sisteme aranĝita indekso. Ankaŭ al d-ro *Dubravsky* mi kore dankas, ke li konfidis tiun lian vivo-verkon en miajn manojn, por ke ĝi iam fariĝu parto de elektronike registrita jura vortaro de Esperanto.

Aliflanke necesos krom amasiĝo de terminara materialo baldaŭa kritika trarigardo kaj sistemigo de ĝi. Ĉio ĉi tamen superas la fortojn de unu sola juristo, kiu nur libertempe povas okupiĝi pri la afero. Ĉiuspeca helpo pro tio estas bonvena. Espereble la nuna kolekto de juraj terminoj en la kadro de Plena Pekoteko instigos al tio.

2. NePIV-aj Vortoj (90/ac-serio)

Prepare al iam aperonta Etimologia Vortaro de Esperanto, s-ro *André Cherpillod* dum pli ol dudek jaroj trakribis multajn Esperanto-vortarojn kaj notis ĉ. 6800 radikojn, kiujn PIV ne registris sub apartaj

enskribo-titoloj, do la "***-vortojn" de Pekoteko. En 1988 li publikigis ilin en la verko <NePIV> kun fonto-indikoj kaj kelkfoje kun "proksimuma signifo", kiel li mem skribas. Temas pri indikoj kiel "insekto", "virnomo", "brita urbo" k.s. Kiam mi demandis lin, ĉu li permesus la enigon de lia kolekto en Pekotekon, s-ro *Cherpillod* afable konsentis. Helpata de lernanto de s-ro *Eichkorn* mi do komencis registri la "ne-PIV-ajn vortojn" laŭ la reguloj de Pekoteko. Tiumaniere ĝis nun nur ĉ. kvarono de <NePIV> eniris PP. Poste mi aldonis la informojn el la fontoj indikataj en <NePIV>, se mi havis ilin ĉemane. En tria paŝo mi aldonis pliajn informojn, precipe difinojn laŭ diversaj enciklopedioj. Fine mi prikomentis kelkajn formojn en la "diskutejo" sub "Rim":. Tamen pro manko de tempo aŭ faka scio, ekz-e pri botaniko kaj zoologio, multaj vortoj ne ankoraŭ estas prilaboritaj. Krome mi povis registri nur tradukojn en etnolingvoj, kiu uzas la Latinan alfabeton, dum la originala verko de s-ro *Cherpillod* en modela maniero same bone redonas la etnolingvajn ekvivalentojn en ne-Latinaj skriboj kiel ekz-e la Araba, Ĉina kaj multaj aliaj. Ĉiukaze daŭre do indas havigi al si tiun verkon, laŭ mi grava por ĉiu sincera Esperantisto kun prilingva intereso. Simile kiel pri la jura parto ĉiuj uzantoj de PP estas kore invitatataj kompletigi la nocio-kompleksojn de <NePIV>, do de la "ac-serio", per difinoj, naci-lingvaj tradukoj kaj komentoj. Ankaŭ tiurilate facile eblas estonta kunlaboro por la kompletigo kaj precizigo de la Esperanta vortprovizo.

Al s-ro *Cherpillod* mi tie ĉi ŝatas denove danki pro lia tuja kaj grandanima preteco tiel kontribui al la nuna kolekto de Pekoteko.

3. Vortoj de la Nuntempo (89/8000 ĝis 89/8199)

Tiu kolekto estas kvazaŭ daŭrigo de la laboro de s-ro *Cherpillod* kaj ampleksas vortojn ne ankoraŭ registritajn en PIV, sed uzatajn en aliaj fontoj, precipe en periodaĵoj kiel "Monato", "Etnismo" k.s. Al tiuj ĉi terminoj s-ro *Eichholz* jam atribuis la daŭrajn Pekoteko-numerojn 89/8000 ĝis 89/8199. Poste li aldonis ankoraŭ nocio-kompleksojn ĝis 89/8276, por ke ĉiuj landnomoj troviĝu en Pekoteko, kies nomoj malsamas en diversaj publikaĵoj. Per mia alvoko "Fariĝu lingvo-observanto", kiu aperis en kelkaj revuoj kaj kies represon vi trovas sur paĝo **XXX** mi invitis kaj daŭre invitas ĉiujn Esperantistojn "observi" la Esperantan gazeton kaj noti laŭ la skemo de Pekoteko ne-PIV-ajn vortojn aŭ vortojn uzatajn en alia senco ol difinita en PIV. Ĝis decembro 1991 dekduo da kunlaboremuloj anoncis sin. Plurajn terminojn kontribuis i.a. la s-roj *Günkel*, *Okelmann* kaj *Evans* kaj s-ino *Erhard*. Vi rekonos la kontribuintojn per la nomo-mallongigoj en la font-indika kampo.

Mia kontribuo pri tiu parto do estas nur instigo kaj laŭeble preciza klavado de la informoj. Klopodante fidele sekvi la principojn de Pekoteko, mi penis laŭeble skrupule gardi la stilon kaj lingvajn preferojn de la kunlaborantoj. Pro tio mi ekz-e registris etno-nomojn per minusklaj komenc-literoj, se la kontribuinto preferis tiun formon, kvankam mi mem preferas tiukaze majusklojn. Tiel povas esti, ke en la sama komplekso ekz-e povas aperi foje "en la germana", foje "en la Germana", depende de la preferoj de la komentintoj. Respekti ilin laŭ la opinio de la "Pekotekanoj" ja estas pli grave ol unueca redaktado, kiel ajn dezirinda tiu estu.

Pliaj aktivaj "lingvo-observantoj" estas bonvenaj. Al la ĝisnunaj kontribuintoj mi dankas kaj esperas je same kontentiga estonta kunlaboro.

Same kiel s-ro *Eichholz* mi esperas, ke mi montris per tiuj projektoj per praktika laboro, kiel pluevoluigo de nia lingvo eblas, kaj ke ĉiu interesata kaj kapabla Esperantisto povas kontribui. Do nun estas la vico de la uzantoj de Plena Pekoteko kritiki ties vortmaterialon.

Kelkaj el la legontoj eble estos ŝokitaj pro la relative multaj "novaj" radikoj, kiuj ne ankoraŭ troviĝas en PIV, sed kiuj nun aperas en PP. Seriozajn kritikontojn mi tamen petas pripensi jenajn punktojn. Nur tre, tre malmultaj terminoj estas novaj en la senco, ke ili aperas la unuan fojon en PP. Nur ili estas veraj "neologismoj". Kontraŭe pli ol 95 % de la "**-vortoj" jam estas uzitaj en periodaĵoj aŭ registritaj en aliaj vortaroj. Ne malmultaj el tiuj 95 % estas veraj "malnovaj neologismoj", kiuj jam estas troveblaj en vortaroj el la dudekaj jaroj, ekz-e en <EV> de 1923 aŭ eĉ jam en <Vér> de 1910! Jam pro tio ili, miaopinie, meritas almenaŭ mencion en Pekoteko, ĉar multaj Esperantistoj ne plu povas havigi al si tiujn elĉerpitajn verkojn. Se registrado ne jam okazis en PIV, tio ofte ŝuldiĝas simple al kaŭzoj de kompost- kaj pres-kostoj, kiuj limigis la haveblan spacon kaj pro tio necesigis rezigni pri multaj tro teknikaj aŭ specialaj terminoj. Nur nun, post kiam la produkt-kostoj draste falis, ĉar ni disponas pri novaj helpiloj, nome pri komputoroj, eblas enmeti en ĝeneralan Esperanto-vortaron ankaŭ specialajn aŭ relative malofte bezonatajn terminojn. Serioza kritiko ankaŭ priatentu la principojn pri enkonduko (aŭ ĉe ni pli ĝuste pri reproduktado) de "neologismoj", kiel ilin saĝe prezentas *Kalocsay* kaj *Waringhien* en Plena Analiza Gramatiko p. 436 kaj kiujn mi konsilas nepre relegi. Laŭ ili *oni devas fari esencan distingon inter la teknika kaj la komuna lingvo*, prijuĝante la neceson de novvorto. *En la teknika lingvo, estas utile, ke la ĉefaj nocioj estu esprimitaj per primitivaj*, do ne kunmetitaj, sed eble "novaj", vortoj, el tri kaŭzoj, nome por ne distranĉi Esperanton *disde la greka-latina bazo*, pro facila

pluderivado kaj preziceco. Se oni de proksime rigardos la ne-PIV-ajn vortojn redonitajn en la supre priskribitajn seriojn de Pekoteko, oni facile konstatos, ke preskaŭ ĉiuj apartenas al teknika, scienca aŭ iel specialigita lingvaĵo, kaj nur malmultaj al la ĝenerala lingvaĵo. Almenaŭ al fakuloj ili pro tio eble estas utilaj. Necesas do konkreta, laŭeble sobra kaj faka kritiko kaj ne nur ĝenerala veado pri "tiom da neologismoj". Mi persone estis relative retirema marki neologismon per la siglo EVIT (t.e. "evitenda"). Konsekvence mi tion faris nur ĉe duoblaĵoj de la tipo "puĉo" - "golpo", kie la sama nocio estas jen esprimita per jam enkondukita termino surbaze de lingvo(-grupo) A jen per neologismo surbaze de lingvo(-grupo) B, sen ke la nova termino alportas pluan informon. En tio mi vidas la danĝeron de disdialektiĝo.

Restas al mi nur peti ĉiujn uzantojn de Plena Pekoteko, ke ili helpu "pludoni la torĉon".

Frankfurto ĉe Majno en marto 1992
Bernhard Pabst

**Enhave senŝanĝa represo de la eldono
1992. La aŭtoroj R. Eichholz kaj E.
Spitaels intertempe mortis. Kontaktu nun**

**Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @).**